# LIGILO

DE

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

N-ro 23 - JUL/AŬG/SEP 1994


## KARA LEGANTO

En tiu ĉi numero vi informiĝos pri gravega okazontaĵo de nia movado: la kunveno de la Federacia Konsilantaro de Brazila Esperanto-Ligo, en Brasília (DF), komence de la venonta jaro. Tio signifas, ke ni fakte ekvivas, kvankam ankoraŭ tre modeste, la federacian sistemon, kaj ke ni survojas al definitiva elimino de multjardekaj mankoj.

Vi, kiu ne havis la bonŝancon partopreni la 30-an Brazilan Kongreson de Esperanto ekscios, ke niaj kongresoj fariĝas veraj forumoj por demokratia pridiskutado kaj kunserĉado de vojoj por matura ekvaciigo de niaj problemoj.

Vi notos nian memorigon pri la elekto de nova estraro dum la venonta kongreso kaj, kio estas pli grava, vi konkludos, ke la strukturo de BEL jam permesas elekton de estraranoj NE LOĜANTAJ en Brasília. Efektive, nia kara Ligo estas BRAZILA...

Finfine, vi konstatos, ke la supraj diritaj vortoj invitas nin pensi pri la neceso plifortigi la unuiĝon de nia movado, kiu cetere, sekve de tio, povas kaj devas okupi pli elstaran pozicion en la Esperantujo.

# LIGILO

Oficiala organo de
BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 03625 70084-970 Brasília (DF) Telefone [061] 226-1298

Aperas trimonate
Redaktas BEL-Estraro





## ESTRARO DE BEL

| | |
|---|---|
| Prezidanto | Francisco Mattos de Oliveira |
| 1-a Sekretário | José Carlos Dorini Ramos |
| 2-a Sekretário | Wilson Álvares de Oliveira |
| 3-a Sekretario | Lício de Almeida Castro |
| 1-a Kasisto | Aymoré Vaz Pinto |
| 2-a Kasisto | Maria das Dores Góes |

Kontrolkomisiono

Altino Araújo Vasconcellos
José Romão Filho
Paulo Ricardo Grazziotin Gomes

Anstataŭantoj

Adolpho de Miranda Silva
Ismael de Miranda e Silva
Maria Isabel Botelho Ramos

## HELPAJ DIREKTOROJ

Adolpho de Miranda Silva
Carlos Maria
Cleto Galvão da Silva

## PREZIDANTO DE LA FEDERACIA KONSILANTARO

Ivaldo Alves de Souza

## KOMITATANO "A"

Symilde Schenk Ledon

## FAKA KUNLABORANTO

Brazila Komitato de Esperanto-Instruado

# 30-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO
# 15-a BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO

La tuta nordorienta regiono de Brazila estas fama pro la beleco de la marbordo kaj pro la gastameco de la loĝantoj. Al tio oni aldonu la trankvilecon de la ĉefurbo Natal, kun siaj larĝaj avenuoj en la urbocentro, multnombraj plaĝoj, belaj dunoj, puraj lagoj, agrabla temperaturo kaj senpolucia aero. Fine oni havigu hotelojn proksimajn al taŭga kongresejo kaj komfortan lokon por la artaj aranĝoj. Jen ingrediencoj el kiuj konsistis la medio kie, de la 10-a ĝis la 15-a de Julio, partoprenis la ĉi-jarajn kongresojn de BEL kaj de BEJO ĉirkaŭ 300 homoj venintaj el diversaj brazilaj regionoj kaj 3 el eksterlando: Ceĥio, Germanio kaj Svedio.

## SOLENAJ ARANĜOJ

Kvankam la konstruaĵoj en Natal ĝenerale estas modernaj, la kongresa malfermo okazis en malnova sed tre bela teatro, kun rozkolora fasado kaj interna korto ornamita de ĉarma ĝardeneto. Tie BEL-prezidanto anoncis la kongresan malfermon. Post mallongaj gratulaj vortoj de la lokaj aŭtoritatuloj ĉeestantaj en la podio, Prof-ro Waldson Pinheiro prelegis pri la kongresa temo: "Esperanto - aliro al lingvoj kaj kulturoj". La programero finiĝis pere de la tradicia kolektiva kantado de "La Espero".

Siavice, la kongresa fermo okazis en la kongresejo mem. Tiam la prezidanto de BEL prelegis pri la graveco de Esperanto kaj rilatis ĝian iniciatoron - nia majstro Zamenhof - al multaj kleruloj kaj scientistoj de la monda historio. Invititaj de la Loka Organiza Komitato, direktoroj de lernejoj en Natal ĉeestis por ricevi esperantajn verkojn, donacitaj al la lernejaj bibliotekoj. Okazis ankaŭ lanĉo de du verkoj: "O centésimo macaco" de Ken Keyes Jr, traduko de S-ro Fernando J.G. Marinho, kaj "Bilinguismo: utopia ou antibabel", de Prof-ro José Passini.

## ARTAJ VESPEROJ

Bone impresis la kongresanojn la altkvalitaj prezentadoj invidivue aŭ grupe en multnombraj artaj aranĝoj. Brilis la korusoj, inkluzive de ne-esperantistaj grupoj. Teatraĵoj de infanoj el urboj Vitória (ES) kaj Alto Paraíso (GO) tre plaĉis al la ĉeestantoj. Oni multe aplaŭdis la prezentadon de S-ino Neide Barros Rêgo, el Niterói (RJ), kiu bonege deklamis. Menciindaj ankaŭ estas la prezentado de regiona muzikstaro. Tiuj eventoj okazis vespere en komforta salono ĉe konstruaĵo "Fundação José Augusto". En la kongresejo vidiĝis ankaŭ arta aranĝo, nome ekspozicio de pentraĵoj verkitaj de esperantistoj, kiu jam fariĝas tradicia dank'al iniciato de S-ino Marija Pozder Almada.

FEDERACIA KONSILANTARO

Unu el la plej trafaj okazintaĵoj de la 30-a BKE estis la decido de la Federacia Konsilantaro rilate al la pli konstanta agado ĉe la movado. En ĝenerala kunveno la konsilantoj kaj/aŭ reprezentantoj el Acre, Alagoas, Amapá, Ceará, Distrito Federal, Paraíba, Paraná, Pernambuco, Rio de Janeiro, Rio Grande do Norte, Santa Catarina, São Paulo kaj Brazila Esperantista Junulara Organizo decidis kunveni en Braziljo, dum la 6-a, 7-a kaj 8-a de januaro 1995 por pritrakti diversajn gravajn temojn. Krom la konsilantoj, partoprenos la eventon BEL-estraro kaj invitotaj kapmovadanoj/aktivuloj .

KONGRESA ĈEFTEMO

Ĉi-jare la kongresa temo estis: "ALIRO AL LINGVOJ KAJ KULTUROJ". Oni pritraktis ĝin kiel duobla temo.

## ALIRO AL LINGVOJ

Sub formo de debato, kunordige de Gilbert René Ledon kaj organize de Symilde Schenk Ledon, prezentiĝis kriterioj de skipo konsistigante ankaŭ de Pastro Machado, Prof-ro Jair Salles kaj S-ro Fabrício Rodrigues do Valle, kiuj pro foresto de la preleganto, Prof-ro Sylla Chaves, jene ordiĝis:

- Ke aliro al lingvoj ne estas disigebla de kulturoj, prefere per uzado de Esperanto;
- Ke estu konsiderata la aliro plus eliro-vidpunkto rilate al Esperanto, kiel progreso por aliaj lingvoj per praktikado de la Internacia LingvoEsperanto, kio respegulas la praktikan valoron de Esperanto;
- Ke oni konsideru la diversajn aspektojn, inter ili la elstaran propedeŭtikan valoron kiel plej gravan por estiĝi ponto al ĉiuj lingvoj;
- Ke estas relativa la aserto de Esperanto-aliro al lingvoj supozante tion kiel esencan pravigon de akcepto kaj forigante ĝian faktan signifon: stato de propra kulturo, apude al la landa kaj monda kulturoj;
- Ke lingvopolitiko estiĝu por Esperanto-enkonduko en internaciaj rilatoj

## ALIRO AL KULTUROJ

Prezente de Prof-ro José Passini surbaze de tekstoj el "Esperanto Sen antaŭjoĝoj" (Prof-ro Walter Augusto Francini) kaj aliaj referencoj, la argumentoj je altkvalita nivelo konstatigis:

- Ke Esperanto, sub formo de propra kulturo konsistiganta el plurecaj kulturoj praviĝas kiel elstara kondiĉo de tutmonda ponto interhomara;

Ke lingvo je tiuj premisoj, nome Esperanto-lingvo, plenumas la kondiĉojn de aliro al kulturoj kaj ties absorbon en reciproka kulturiĝo;
Ke, sub tiaj nekompareblaj elstaro kaj konstatoj efektive Esperanto rolas kiel aliro al lingvoj kaj kulturoj.

DELEGITA RETO DE UEA EN BRAZILO

Sub la kunordigo de la senlaca kaj kapabla UEA-Ĉefdelegito por Brazilo, S-ino Symilde Schenk Ledon okazis kadre de la Nacia Kongreso, la 3-a Seminario de Delegita Reto, kiu konsistis el 3 kunsidoj, kun diversaj temoj: statistiko de membraro, malkresko de la reto pro ekonomiaj malhelpoj, kandidatoj al vakaj postenoj kiel Regiona Delegito en Nordoriento kaj Nordo, Delegita Reto en Sudameriko sub fina decido de UEA, prezento de protokolo de la 2-a Seminario de Argentino (Amerika Renkontiĝo), komento pri protokolo de kunsido en Universala Kongreso de Esperanto en Valencio (1993).

BEJO

Laboro kaj Espero, jen la du taŭgaj vortoj por karakterizi la partoprenon de la junularo dum la komuna kongreso de BEJO kaj de BEL. Denove la Libroservo restis sur la ŝultroj de BEJO-anoj, kiuj ĉiutage efike laboris. Laboris kaj Esperis! Esperis pri BEJO pli vigla kaj agema! En etoso plena je espero, la junularo kunvenis kaj decidis antaŭenigi la brazilan junularan movadon, restigi BEJO-n sendependa (dum la Kongreso estis proponita la transformiĝo de BEJO en BEL-sekcio) kaj elekti la jenan estraron: prezidanto Ilmar Gomes Ferreira, vice-prezidanto Miguel Arcanjo, Unua Sekretario Márcio Santos, Dua Sekretario Júlio Cesar, Kasisto Leonor Couto, ĉiuj loĝantaj en ŝtato Rio de Janeiro.

EKSKURSOJ, BALOJ KAJ BANKEDO

Jen programeroj tre ŝatataj de ĉiuj! Ĉiuvespere eblis viziti dancejojn kaj kabaredajn prezentojn. La oficiala bankedo kontentigis pli la manĝemulojn per variaj pladoj kaj dolĉaj frandaĵoj ol la drinkemulojn, pro manko de la tradicia vino kaj de la refreŝiga biero. Pri la allogaj plaĝoj de Natal estas superflue priparoli. Suden kaj norden la blua-verda maro kisas kilometrojn kaj kilometrojn da blanka sablo, ornamita de elegantaj kokosarboj. Movaj kaj senmovaj dunaroj imponas, dume trankvilaj lagoj malstreĉas kaj la korpon kaj la spiriton. Kadre de la programo okazis ekskursoj merkredon. Post la kongreso multaj profitis por turismi, inkluzive al la belega insularo "Fernando de Noronha", vera ekologia

sanktejo, kie dolfenoj memvole petolas apud la naĝantaj turistoj. BEL-estraro timis iomete, ke la homoj anstataŭ partopreni la kongresejajn erojn "fuĝus" al turismaj lokoj de Natal. Tamen, se tio okazis certe estis malgrandskale. La kongresanoj vere meritas gratulojn, ĉar ili mature partoprenis de la laboraj kunvenoj kaj amuze de la distraj eroj.

BEL-KUNSIDOJ

Multfoje oni kunvenis dum la kongreso por pritrakti administrajn temojn. Kvankam ili okazis samtempe kun aliaj programeroj, la partopreno kaj de relative grandnombro da kongresanoj kaj de federaciaj konsilantoj t.e. reprezentantoj de ŝtataj asocioj aliĝintaj al BEL, atestis la grandan intereson de la homoj por pridiskuti la brazilan movadon. Jen resumo:

ESTRARAPORTO 1993 - Prezidanto de BEL, S-ro Francisco Mattos de Oliveira, raportis ke ĝis la 31-a de decembro de la pasinta jaro, 751 homoj partoprenis de la Perkoresponda Kurso, el kiuj 275 individue kaj 476 pere de 111 grupoj. De la tuto, 130 sukcesis fini la kurson ĝis 1993; la interna bulteno LIGILO regule aperis; BEL peris 257 revuabonojn el kiuj "El Popola Ĉinio" reprezentas 40%; estis ricevitaj 1489 korespondaĵoj kaj senditaj 1230; la kampanjo por E-libroj en Biblioteko kaj gazetobudoj rezultis ne bone, ĉar nur 28 fojoj oni aĉetis librojn por tiu celo; Libroservo vendis 2920 erojn, sendis 533 fakturojn al 238 aĉetintoj, kio signifas kreskon kompare al antaŭa jaro; la financa situacio de BEL estas komforta, kun aplikoj ĉe banko kaj kredita saldo ĉe UEA; Fondaĵo Almada, kies celo estas havigi monon por speciala projekto, ĉefe aĉeto aŭ konstruo de nova sidejo, aplikis la mondonacojn ricevitajn, kaj ĝis nun la tuta enspezo sumas US$ 4.100,00, ĉirkaŭ kvinono de la prezo de ĉambro simila al tiu de BEL-sidejo.

INFORMSERVO - Temas pri projekto ellaborata de BEL-estraro por centralizi noticojn kaj artikolojn pri E-o ĉerpitaj el esperanta gazetaro aŭ speciale verkitaj por diskonigo al ne esperanta publiko. Grupo de esperantistoj kun spertoj pri ĵurnalismo ekzamenos la tutan informmaterialon, enmetos ĝin en mikrokomputilan arkivon, kies programo estas en prepararo, kaj poste liveros ĝin al la gazetaro en Brazilo.

KONSTRUO DE NOVA SIDEJO - BEL-prezidanto informis pri kunveno okazinta en Braziljo, al kiu oni invitis la lokajn esperantistojn, por pritrakti la konstruon de sidejo sur la tereno donacita de la registaro. La partoprenintoj de tiu kunveno entuziasme apogis la ideon pri la konstruo kaj prezentis sugestojn por la koncerna projekto, dum du inĝenieroj prezentis sin kiel voluntuloj por profesie kunlabori.

**PROGRAMOJ/PROJEKTOJ** - Rilatas al propono, kiun BEL-estraro diskonigis antaŭ pli ol 1 jaro. Pere de ĝi, oni invitis ĉiujn esperantistoj, individue aŭ grupe, verki studon laŭ siaj fakaj konoj aŭ spertoj, surbaze de listo de programoj/projektoj, kie programo estas la aro da konstantaj funkcioj, kiujn BEL devas plenumi por atingi siajn laŭstatutajn celojn, kaj projektoj estas aro da specifaj portempaj aŭ konstantaj agoj por efektivigi ĉiun programon. Ekzemplo de programo: Instruado de E-o. Ĝiaj projektoj estas: E-o kurso por infanoj; E-o kurso per televizio, E-o kurso por religiaj medioj k.t.p. Dum la kongreso oni diskonigis la ĝis nun ekzistantaj projektoj, nome: Esperanto-kurso por infanoj; Esperanto ĉe Ne Registaraj Organizaĵoj; Agadplano ĉe universitata medio; Agadplano ĉe katolika medio; Esperanto en framasona medio; Esperanto kaj Kooperativismo. Prof-ro Aristophio Andrade Alves Filho komentis iomete pri la projekto, kiun li respondecas "Esperanto ĉe Ne registaraj Organizaĵoj". Tamen ĝis la 30-a BKE neniu projekto estas finelaborita.

**ELEKTO DE NOVA ESTRARO EN 1995** - Oni memorigis, ke dum la venonta nacia kongreso, en Juiz de Fora (MG) okazos balotado por elekti novan BEL-estraron. Eblas elekti homojn ne loĝantaj en Braziljo. Tamen preferinde estas ke la prezidanto, 1-a sekretario kaj 1-a kasisto, estu samurbanoj, por faciligi la plenumon de administraj taskoj.

**JARKOTIZO POR 1995** - Celante pligrandigi la nombron de anoj dum 1994, BEL-estraro malaltigis la bazan kotizon (SI), tiel ke ĝia valoro egalis al 100 naciaj poŝtmarkoj anstataŭ 150. La rezulto estis katastrofa! La membraro ne kreskis sed la enspezo malgrandiĝis. Pro tio, kaj pro la nuna monŝanĝo en Brazilo, oni interkonsentis ke BEL-estraro determinos novan jarkotizon valoranta por 1995.

**PERKORESPONDA KURSO** - Oni informis, ke la aŭtoro de perkoresponda kurso nuntempe uzata de BEL, Prof-ro Euclydes Geraldis de Carvalho, malavare disponigis la tutan tekston por presado de pliaj 1.000 ekzempleroj, sen financa respondeco flanke de BEL, rilate al kopirajto!

**NACIA REVUO** - D-ro Ivaldo Alves de Souza, prezidanto de Federacia Konsilantaro referencis pri riĉenhava sugesto ricevita de S-ro Henrique A.K. Mendonça kun skizo ampleksa pri la nepraj kondiĉoj por tia publikigo, kun indikoj pri kostoj por ties eldono; ĝi estu dumonata, 12-paĝa kaj ekstartu post havigo de materialo-enhavo por almenaŭ 6 numeroj kaj monrimedoj disponeblaj por 4 numeroj; ĝi kalkulu je propagandapogo. Kosto por 1.000 ekzempleroj: US$ 450,00. S-ro Gilbert René Ledon prezentis alian kostoproponon de firmao el San Paŭlo, kaj tio estis notita; krome S-ro Ivaldo petis ke S-ro Ledon partoprenu la komisionon pri Nacia Revuo, pro liaj spertoj eldonaj.

# BEL-ANGULO

BEL-ANOJ ESTAS NOTICOJ!

Al du anoj en Belo Horizonte (MG), nome D-ro José Róiz kaj D-ro Wilson Veado ni respektoplene sendas sincerajn gratulojn. D-ro José Róiz, kune kun D-ro Rokuro Makabe, gajnis gravan premion de Universala Medicina Esperanto-Asocio. Temas pri UMEA SHINODO-PREMIO 1994. Krome, Medicina Esperanta Revuo publikigis kvar artikolojn verkitaj de li: *Kolesterolo kaj maljuniĝo, Koradaptiĝo, Plilongiĝo de postvivado, Mangkutima ŝanĝo.* Dume, D-ro Wilson Veado enposteniĝis kiel prezidanto de "Casa de João Pinheiro" (Instituto Histórico e Geográfico de Minas Gerais), je la 15-a de Aŭgusto.

LA HODIAŬA LINGVO

BEL-ano, Prof-ro Paulo Amorim Cardoso sendis interesan tekston verkita de li, kiun ni plezure transkribas: "

*"Ni bezonas modifi la veron dirita de Zamenhof. Jes, mi diris modifi la veron dirita de la iniciinto de Esperanto, la genia D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof. Modifi lian veron! Kial? Ĉar tio, kion li diris estis vero en tiu tempo. Hodiaŭ ni vivas en la centjariĝo de Esperanto, hodiaŭ ni uzas la lingvon internacian vere internacie, hodiaŭ Esperanto jam estas la internacia lingvo. Oni uzas Esperanton en kongresoj, en leteroj, en la aŭtobusoj, sur la stratoj, en la hejmoj kiel gepatra lingvo, en la komerco ktp ktp. Ĉu vi ne uzas Esperanton por legi ĉi tiun artikolon skribita hodiaŭ? Ĉu ne hodiaŭ vi legas ĝin? Oni ŝaltas radion kaj aŭdas eksterlandan programon en Esperanto, hodiaŭ!!! Estas hodiaŭ la uzado de Esperanto farita de pli ol miliono da homoj, estas hodiaŭ ke oni studas Esperanton en multaj universitatoj tra la tuta mondo, estas hodiaŭ ke ni amindumas, amas, geedziĝas uzante la lingvon kreita de L.L.Zamenhof. Do, ni modifu lian diraĵon kaj ni diru: Esperanto estas la* ***hodiaŭa lingvo*** ***(n estonta lingvo). La futuro jam alvenis. La estonto de Zamenhof jam estas HODIAŬ."***

ESPERANTO-KURSO SENPAGE. ĈU JES AŬ ĈU NE?

Niteroja Bulteno publikigis diskutindan artikolon en sia numero 81 (Aŭgusto 1994). Laŭ la aŭtoro, la ĉefredaktoro S-ro Alcebíades Geraldo Lopes, post 10 jaroj li ŝanĝis sian opinion pri nepra pago de Esperanto-kurso. Lia nuna sinteno estas tutradikale kontraŭa, ĉar li asertas: *"Insisti pri la ne senpageco de la kursoj estas insisti pri la malharmonio ene de niaj vicoj."* Tamen li rekomendas, ke la instruistoj devas ricevi iom da monoj, same kiel okazas en la publika lerneja reto, kie la infanoj lernas senpage sed la instruistoj ricevas salajron. Koincide, en la sa-

ma monato ni ricevis cirkuleron, kiu temas pri kontraŭa opinio rilate al Esperanto-kurso. Ĝi komencas jene: "*En Salvador - BA, la privata lingvolernejo, AEC, provas profesie enkonduki la instruadon de la internacia lingvo Esperanto en siajn klasĉambrojn.*" Kaj finas per la sekvontaj klarigoj: "*Esperanto estas traktota samrange kun la Angla kaj la Hispana, ne nur la planado, sed ankaŭ la marketingo. La prezo estas unika. Se oni tie jam lernas unu el la tri lingvoj, oni ricevas rabaton, kiu validas egale por la tri. La enmerkatigon de la Esperanto-kurso zorgos AEC mem per la samaj altnivelaj helpiloj de ĝi uzataj por la aliaj kursoj (faldfolioj, afiŝoj, anoncoj en gazetoj, ĵurnaloj, radi- kaj televidstacioj). La planadon kaj la gvidadon prenos la instruisto Ronilson Mota, kiu adoptos la Zagreban Metodon, laŭ la lernolibro kaj kasedo eldonitaj de Zamenhof Editores.*" La perkoresponda kurso de BEL ne estas senpaga kaj tio, ĝis nun, ne kaŭzis problemon... Krome, la publika lernejo ne estas tute senpaga, ĉar ĉiuj civitanoj pagas impostojn ĝuste por tio, ricevi "senpagajn" servojn de la ŝtato. Ĉu S-ro Alcebíades aŭ eblaj samopinianoj pravas aŭ ne? Jen interesa demando!

## BEDAŬRINDA MISKOMPRENO I

Tradicia brazila bulteno publikigis en sia numero de aprilo/majo/junio komentarion, laŭ kiu eks BEL-ano, junulo Ramiro Barros de Castro foriĝis de la movado en 1989 pro manko de apogo, flanke de BEL, al lia poresperanta laboro en la norda regiono de Brazilo. Tiurilate la nuna BEL-estraro scias nur, ke fakte la junulo bedaŭrinde ĉesis labori por Esperanto kaj ke lia laboro favore al Esperanto estis bonega. Nu, gardi la prestiĝon de iu ajn institucio estas devo de la koncerna estraro. Tial por provi klarigi la aferon, ni telefonis al eks prezidanto de BEL por la periodo 1986-1989, fraŭlino Néia Lúcia Souza, kiu antaŭ la oficperiodo en BEL multe laboris kune kun la junulo Ramiro en Brazila Esperantista Junulara Organizo - BEJO. Ŝi taksis senprava la bultenan komentarion. Eĉ S-ro Ramiro ne komprenis kio okazis, ĉar tuj post la apero de la bulteno li sendis al ni leteron klarigante, ke lia forigo havas neniel rilato kun Ligo. Similan leteron li sendis al la redaktoro de la menciita bulteno. La okazintaĵo estas triobla bedaŭrinda! Unue pro la eksigo de kapabla kaj laborema esperantisto. Due pro la ĝeniga komentario. Kaj fine pro la terura konfuzo pri kio fakte estas BEL. Brazila Esperanto-Ligo estas la rezulto de la kunigo de ĉiuj BEL-anoj kaj ĉiuj grupoj, kiuj apogas la nacian institucion. Se iu ajn el ili agadas por Esperanto en iu ajn parto de Brazilo, tiu signifas ke BEL estas tie. Do estas sensensaĵo aserti, ke BEL ne apogas agon de BEL! Tamen, tute alia afero estas la sinteno de la estraro. Pro tio, ke la estraranoj estas ne perfektaj homoj, ili povas fuŝi aŭ pro eraraj agoj aŭ pro ne agi. Resume, se vi apartenas al BEL, vi rajtas kaj devas plendi ĉe la estraro, kiam laŭ vi ĝi eraris, sed neniam misfamigi la institucion, ĉar ĝi estas la tuto, inkluzive la bultenoj.

BEDAŬRINDA MISKOMPRENO II

Alia bulteno publikigis en sia numero 1.361, ke Brazila Esperanto-Ligo disdonas spiritismajn librojn en Esperanto al eksterlandaj institucioj. Sekve venis al BEL-sidejo letero de BEL-ano kun plendo pri tia partieca ago flanke de BEL. Vere okazis miskompreno! Kiu disdonas tiujn librojn estas "Associação Mundo Espírita" (Spiritisma Mondo Asocio), senprofita asocio, kun sidejo en Braziljo, starigita por disvastigi Spiritismon tra la mondo pere de libroj en la portugala, franca, angla, hispana kaj esperanta lingvoj. Se la libroj estas en Esperanto, AME aĉetas ilin nur ĉe BEL-Libroservo. Kompense BEL enpakigas kaj sendas la librojn eksterlanden, laŭ la peto de AME kaj je ties kosto. Do, la rilato BEL x AME estas nur komerca, favora al BEL pro la granda librovendado, kaj favora al AME pro tio, ke ĝi havas nek komercan strukturon nek enskribon kiel eksportanto/ importanto.BEL-estraro jam sendis klarigan leteron al la bulteno.

KONFLIKTO-TAGO

Pere de LIGILO n-ro 21 (jan/feb/mar-94) ni informis, ke ĉi-jare ni klopodus partopreni de la tiel nomata AGO-TAGO. En 1992 ni sciis pri la evento post ĝia okazigo en Eŭropo. En 1993 ni ricevis cirkuleron de UEA-Centro Oficejo sed ne ĝustatempe. Ĉi-foje dum longa tempo ni atendis la informon pri la dato de AGO-TAGO (ĝi varias laŭjare) tamen denove ĝi malfruiĝis. Mezo de Septembro alvenis cirkuleron de Centro Oficejo de UEA kaj tuj post la gazeto EVENTOJ, kiu ekde 1992 pritraktas la temon. Terura surprizo! CO de UEA sciigas, ke la AGO-TAGO okazos en la 8-a de Oktobro dume EVENTOJ informas, ke la dato estas la 1-a de la sama monato. La misinformo ne estas nur pri la dato. CO de UEA asertas, ke "*Se la dato 8-a de oktobro nepre ne konvenas pro iu kialo, uzu alian tagon proksiman.*" kaj kune kun la cirkulero venis kserokopion de la unua paĝo de EVENTOJ (1/septembro-93) en kiu aperas la jenon "*Plej gravas: la samdateco*" kaj "*La intereson de ĵurnalistoj kaptis ĉefe ne esperanto mem, sed tiu fenomeno, ke 'hodiaŭ okazas similaj eventoj dise en Eŭropaj (ĉef)urboj*". Perletere ni sugestis kaj al Centra Oficejo de UEA kaj al EVENTOJ, ke oni difinu konstantan tagon, ekzemple la dua sabato de oktobro. Tio permesos al la landaj asocioj akurate pritrakti la temon sen lastahora surprizo. Tamen, se iu asocio en Brazilo okazigos ion, tiu sendu al ni raporton por ke ni informos pri ĝi en nia bulteno.

# FONDAĴO ALMADA

Dum la tria ĉi-jara trimestro la jenaj donacintoj sendis monon al Fondaĵo Almada. Al ĉiuj ni tre dankas!

| Donacintoj | | Sumoj |
|---|---|---|
| Anápolis Esperanto-Klubo (*) | R$ | 100,00 |
| Carlos Alberto Andrade (*) | R$ | 9,00 |
| Carlos Fernando da Costa Alves (*) | R$ | 9,00 |
| Cleusa Maria Leone Cezar (*) | R$ | 9,00 |
| Denisar Arneiro (*) | R$ | 15,00 |
| Denise Arneiro Deslandes (*) | R$ | 9,00 |
| Denise Saraiva (*) | R$ | 9,00 |
| Ecy da Silva Ferreira (*) | R$ | 9,00 |
| Jorge Neves Cezar (*) | R$ | 9,00 |
| José Bispo Correia | R$ | 20,00 |
| Maria da Guia Amorim (*) | R$ | 9,00 |
| Marly de Oliveira Moyses (*) | R$ | 9,00 |
| Paulo Roberto Siqueira Silva | R$ | 10,00 |
| Sérgio B. Justo (*) | R$ | 15,00 |
| Tobias Ferreira (*) | R$ | 9,00 |
| Wilson Pereira Deslandes (*) | R$ | 9,00 |
| Entute | R$ | 259,00 |

Ni aperigis en Ligilon n-ro 20 liston de fondintoj de FA. Bedaŭrinde mankis iu, kiu donacis monon dum la 29-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Julio/93, en San-Paŭlo. Estas S-ro Paulo Gontijo Veloso de Almeida, al kiu ni pardonpetas kaj tre dankas pro lia apogo.

(*) Ĉiumonataj donacintoj

## KONDOLENCOJ

Je la 29-a de Septembro forpasis, pro kora malsano, la tre konata esperantisto S-ro Igor Colonna Valevski, kiu lastatempe loĝis en Sobradinho, satelita urbo de Braziljo. Pro tio, ke tie ne estis parencoj liaj , BEL zorgis pri ĉio rilate al la enterigo.

BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Cx. Postal 03625 Telef (061) 226-1298
70084-970 BRASÍLIA - DF BRASIL

**IMPRESSO**